

Rio Esperantista

Oficiala Organo de Asocio Esperantista de Rio-de-Janeiro

N-ro 195 (2015:3)

Jul - Sep 2015

AERJ - LINGUA
INTERNACIONAL ESPERANTO



La Esperantista
Sanktulo

Ni partoprenis
en la Bienalo!

La legendo
fariĝas fakto

Babilado kun...
Fabrício Possebon

“La Kurso en
Poznano”

Rio Esperantista

Oficiala Organo de Asocio Eperantista de Rio-de-Janeiro

N-o 195 (2015:3)

Jul - Sep 2015

74-a jarkolekto

Redaktas: Fernando Pita

Aranĝas: Allan Argolo


Kovrilo:

Foto: Thiago Lara, *Carlitos dum la XVII Internacia Libro-bienalo de Rio-de-Janeiro.*



Associação Esperantista do Rio de Janeiro


Rua Teófilo Otoni, 135 / 302
telefone: 2467-4296

 aerjrj@hotmail.com
disvastigo.aerj@gmail.com

 www.aerj.org.br

 facebook.com/aerj.esperanto


 youtube.com/user/TVAerj



Rio Esperantista

Informativo da Associação Esperantista do Estado do Rio de Janeiro

Edição quadrimestral setembro – dezembro / 2010



Enhavo

El la Redakcio	_____	3
Ni partoprenis en la bienalo!	_____	4
Scenoj de la bienalo	_____	6
La Esperantista Sanktulo	_____	7
La legendo fariĝas fakto	_____	9
Babilado kun Fabrício Possebon	_____	11
“La Kurso en Poznano”	_____	14
Arkones	_____	17

Kio okazis? Kial Rio Esperantista tiom malfruĝis? Tiuj du demandoj ja estis tre ofte aŭditaj de mi kaj aliaj estraranoj de AERĴ dum lastaj monatoj, kaj deco postulas ke ni ne nur pardonpetu sed ankaŭ ke ni donu, al anoj de AERĴ – kies organo tiu revuo estas – la necesajn klarigojn.

Nia lasta eldonita numero estis publikigita en julio 2015, do espereblas ke, en septembro ĉiuj havus enmane novan numeron de *RE*. Tamen, oni ne kalkulis pri la enorma streĉo kaŭzita al ni ĉiuj de nia partopreno en la Bienala Librofojro de Rio – pri kio vi legos ĉi-numere.

Tamen, aferoj, kiuj rekte atingis la stacion de *RE* rapide multobliĝis: se mi, la “redaktisto” tuj devis forvojaĝi al la pola urbo Poznano por nova stud-sesio de la Interlingvistikaj Studoj en la Universitato Adam Mickiewicz, kaj ankaŭ por partopreno en la 31-a Arkones (Artaj Konfrontoj en Esperanto), kaj vi ankaŭ legos iom pri la Studoj kaj pri Arkones – bone, mi kredas ke tio iomete mildigos vian koleron pro nia malfruĝo, ĉu ne?

Plie, alproksimiĝante la jarfino, mi kredis, ke estis horo por malakceli la laborajn taskojn kaj alĝustigi la eldonritmon de la revuo. Tamen, komence de oktobro mi ricevis nerifuzeblan (kredu, mi ĝin rifuzus, se mi povus!) inviton kandidatiĝi al seĝo en la Brazilia Akademio de Filologio. Kun nekredemo, mi “devigite” akceptis la inviton kaj lanĉis min al politika kampanjo pri mia nomo. Fine, kun granda surprizo, mi ricevis 32 el la 37 eblaj voĉoj, kaj jen mi akademiano... Mi ja esperas ke tiu mia nova kondiĉo iel taŭgos por ke Esperanto iĝu pli agnoskata en la brazila akademio kaj universitata



medio, sed al tio tempo respondos.

Sed ne nur mi havas problemojn: nia kara Allan Argolo, kiu sole respondecas pri la fasonado de nia revueto, estas nun en la lastaj jaroj de sia kurso pri Inĝenierarto en la Ŝtata Universitato de Rio-de-Ĵaneiro, kaj ĉar tio forrabas de li multe da energio, li bezonis ekstran tempon por bone fasoni laŭ la ĉiam atendata kvalito.

Tamen, kiamaniere, nia revuo reprenos sian kutiman eldonritmon? Tion oni ankoraŭ analizas, sed decidon pri tio devas esti prenita kune kun la tuta estraro de AERĴ, kaj mi promesas ĝin doni al la legantoj tuj kiam oni havos tiun decidon.

En ĉi tiu numero vi ankaŭ legos pri unu el la furoraĵoj de nia Bienalo: la *Kompleta Gramatiko de la Tupia Lingvo*, de Francisko Valdomiro Lorenz. Ni intervjuis prof. Fabrício Possebon, la granda respondeculo pri ĝia eldonado, danke al kiu tiun verkon finfine trovis sian destinton esti konata de brazila (kaj internacia) esperantistaro. Vi ankaŭ iom scios pri Sankta Maksimiliano Maria Kolbe, la esperantisto kiu estis sanktigita de la Katolika Eklezio – eĉ se vi ne estas katoliko, estas bone scii al kiu vi povas peti helpon se vi eble ne bone regas la akuzativon, ĉu ne?

Fernando Pita



Jes, ni partoprenis en ĝi! Eĉ se kontraŭ la “apogon” de tiuj kiuj rifuzis kontribui al tiu ideo, ĉar “la mono investota en tio povos subteni aliajn asociojn dum pli ol tuta jaro”, kaj kiuj ankaŭ diris ke “esperantistoj ne vizitos tiun lokon, ĉar ĝi estas tre malproksima de la urbocentro”. Eĉ se kontraŭ la deziro de kelkaj kiuj multe klaĉis, ke “tio estas frenezaĵo”, ke “ili neniam sukcesos tion fari”, ke “ili deliras” kaj aliaj stultaĵoj kiuj resumiĝas en “tio neniam okazos”, “pro tio, la movado ne moviĝos”... Same kiel Galileo, AERĴ povas nun respondi: “Kaj tamen ĝi moviĝis!”

Bone, karegaj legantoj, nun, post

kiam mi ĵus elirigis ĉion kio de monatoj akumuligis en mia gorĝo, mi povos fari mallongan skizon de ĉio travivinta de ni, kiuj vizitis, partoprenis kaj deĵoris en la budo de AERĴ ĉe la Internacia Bienalo de Rio (aŭ se vi preferas neglekti tiun tre utilan pivan vorton, vi povas diri “Dujaran Internacian Librofoiron de Rio”, estu laŭplaĉe...)

La ideo naskiĝis el revo de nia prezidanto Márcio Santos, kiu skizis la ĝeneralajn trajtojn de la projekto kaj sindone moviĝis por ke oni ekkaptu, ĉe la nacia esperanto-movado, la monon necesan por akiri, ĉe la organizantoj de la evento, la budon mem.

Malavaraj samideanoj el la tuta Brazilo kontribuis al tio (al ili, koran dankon!).

Nia samideanino Maira Nobre, tiama direktorino pri disvastigado, bonefike organizis ĉion rilatan al la konstruado de la budo (aranĝo, meblaro, ekspoziciado de libroj, ktp.) Kaj plie: ŝi mem, koste de multe da ŝiaj energioj, vizitis esperanto-klubojn, lernejojn, neregistaraj organizoj, eĉ la urba konsilantaro, por ne nur disvastigi ĉe ili Esperanton sed por serĉi apogon al nia afero. Sed la plej grava el ŝiaj faroj estis selekti, inter lokaj kaj aliregionaj esperantistoj, la plej kompetentaj homoj por deĵori ĉe nia budo kaj promocii trejnadojn por ke ili agordu siajn diskursojn rilate al Esperanto. Tiuj trejnadaj estis gviditaj de niaj, ne nur karegaj, ankaŭ koregaj, amikoj Pedro Cavalheiro kaj Rafael Zerbetto, kaj perinterete kaj ĉeeste, dum tuta semajnfino en la sidejo de KKE, kiu malfermis al ni siajn pordojn por ke tio okazu, kaj).

Solvitaj tiuj problemoj, mankis nur unu: Kiajn librojn oni vendu? El kie oni havu ilin? Je tia horo ni ricevis grandan kunlaboron de la libroservo de EASP, kiu sendis al ni siajn plej bonajn, novajn kaj belaspektajn librojn. Ankaŭ tri libroj estis oficiale

lanĉitaj dum Bienalo: la brazila versio de la *Fundamento de Esperanto*, fare de Túlio Flôres; la *Kompleta gramatiko de la tupia lingvo*, de Francisko Valdomiro Lorenz – pri kio vi plu legos en tiu sama numero de *RE* – kaj la *Baza Kurso de Esperanto*, de tiu kiu nun skribas. (Fiere mi konfesas, ke tiu ĉi estis la plej fuŝore disvendita libro en nia budo: pli ol 100 ekzempleroj – aĉetitaj precipe de neesperantistoj).



Fine, la laboroj ekkomencis: dek tagoj da laciga laborado, atendado da homoj, disvendado de libroj, disvastigado de Esperanto al la pasantoj, miloj da personoj eksciis kio estas Esperanto, scivolis pri ĝi, aĉetis librojn, enskribiĝis en kursoj, ktp. Ĉiuj planoj faritaj de ni – kaj anoncitaj en la antaŭa numero de *Rio Esperantista* – estis sukcese plenumitaj!

Fotaro Scenoj de la Bienalo



Kvankam en nia brazila kaj loka movado “praktikantaj katolikoj” malabundas, mi kredas ke ĉiuj – religiemuloj aŭ ne – esperantistoj devas koni pri “nia” sanktulo. Jes, inter la multaj homoj kanonizitaj de la lastaj papoj estas almenaŭ du esperantistoj, la plej fame konata el ili estas Sankta Maksimiliano Maria Kolbe.

Tiu bildo pri esperantista sanktulo estas iel ŝokiga por multe da homoj, ĉar oni ĉiam pensas pri sanktuloj kiel homoj vivintaj en dista pasinteco, kaj estas iom malfacile pensi pri ili kiel homoj kiuj vivis en tempo tre proksima al la nia. Sed, tiel estas. Sankta Maksimiliano Kolbe naskiĝis en Pollando je la 8-a de januaro 1894 kaj estis mortigita de la nazioj en *Auschwitz* je la 14 de aŭgusto 1941.



Fariĝinte katolika pastro ankoraŭ tre juna, Kolbe, kiel bona franciskano, fondis misiojn ne nur en aziaj landoj, kiel Barato kaj Japanio, sed eĉ en Pollando mem. En tiuj misioj li multe helpis kaj protektis precipe drogulojn,

prizonuloj kaj eksprizonuloj, multe defendis politikajn kaptitojn kaj ĵurnalistojn kiuj estis persekutitaj de tieaj registaroj. Li ankaŭ multe militis en kontraŭabortisma movado.

Por pli bone disvastigi siajn idealojn, kaj celante “rekristanigi katolikojn”, kiel li mem diris, li kreis la *Milicon de l’ Senmakula*, predika kaj misiista grupo kies unua celo estis disvastigi la kredon je Maria kiel perantino inter Jesuo kaj homoj.

Tiam, por plibone alĝustigi la agadon de la milico, Kolbe tuj fariĝis radio-amatoro (imagi kion tio signifis en la 20-aj jaroj de la 20-a jarcento!), fakte li estis la unua homo kiu uzis radion por evangeliigaj servoj. Ĝuste ĉar li devis prediki kaj paroli al milicanoj en diversaj mondopartoj, Kolbe lernis kaj uzis nian

lingvon, kaj en radio kaj en kelkaj tekstoj. Kompreneble Maksimiliano Kolbe neniam estis por-esperanta aktivulo, tamen li elmontris kiel Esperanto povus ja esti uzita de ordinraj homoj kies precipa intereso ne

estis lingvaj, tio – laŭ multaj kleraj esperantistoj – estas la plej taŭga propagandilo kiun oni povas uzi.

La ventoj ŝanĝiĝis kiam Pollando estis invadita de la nazioj en 1939. Tiu invado eksplodigis la 2-an Mondmiliton, kaj, kvankam la nazioj neniam persekutis katolikajn pastrojn, Kolbe estis spionata de ili pro diversaj kialoj, ĉar tiu homo: **a)** estis klera pri radio kaj facile povus komunikiĝi kun la malamikoj de Hitler, **b)** li mem havis sian propran “micon”, kiu, kvankam estis nur religia grupo, ja povus fariĝi kunlaborantoj de la kontraŭnazia rezistanco, kaj **c)** Kolbe estis iam konata kiel defendanto de politikaj persekutatoj. Do, en 1940, fine la nazioj arestis kaj sendis lin al koncentrejo de *Auschwitz*.

En la koncentrejo, Kolbe daŭrigis sian misiistan laboron, predikante al arestitoj kaj ĉiutage preĝante la meson, dividante sian tagan manĝaĵon kun aliuloj kaj komfortante ilin. Tamen, komence de aŭgusto 1941, kiam la nazioj elektis homojn por esti mortigitaj, ili elektis ulon nomatan Franciczek Gajowniczek. Tiu viro, kiu estis apud Kolbe, tuj ekkomencis plori, bedaŭrante pro siaj edzino kaj filoj. Tiel Maksimiliano Kolbe sin oferis por

morti anstataŭ li, ĉar li “jam estas oldulo kaj ne havas familion por subteni”. Do la nazioj kunportis lin al kelo kie li restis, izolita, malsatanta kaj sen akvo, dum tuta semajno. Ne sukcesiginte lin mortigi tiamaniere, fine la nazioj injektis dozon da veneno en li.

Pro sia sindediĉo al evangelia agado, sed precipe por sia sinofero defende de alia vivo, kaj, kompreneble, post la dumirakla pruvo postulita de la vaticanaj aŭtoritatoj; Maksimiliano Kolbe estis kanonizita de la papo Johano Paŭlo la 2-a en 1982. Inter la ĉeestantoj de la kanoniza ceremonio, estis s-ro Franciczek Gajowniczek, la homo pro kies vivo li oferis la sian. S. Maksimiliano Kolbe estas hodiaŭ konata kiel patrono de radioamatoroj, kontraŭabortaj agantoj kaj, kompreneble, esperantistoj!

S-ro Gajowniczek kaj la papo
Johano Paŭlo la 2-a en la kanoniza ceremonio



Preskaŭ ĉiu brazila esperantisto iom, se ne ĉiom, lernis de Francisko Valdomiro Lorenz. Tiu homo, kiu ne nur estis unu el la enkondukintoj de Esperanto en nia lando, sed ankaŭ ĝin instruis dum sia tuta vivo, estas la aŭtoro de la tutlande konata *Esperanto sem Mestre*, la unua libro, verkita en Brazilo, kiu vere fokusis tiujn, kiuj deziras progresi en la lernado de nia lingvo. Li estis ankaŭ tradukinto de diversaj poemoj, ekzemple, la *Bhagavad-Gîtâ*, epopeo de antikva Hindio, kiu, oni diras, li esperantigis rekte el la sanskrita.

Sed ne nur el la sanskrita Lorenz tradukis: lia libro *Diverskolora Bukedeto* enhavas poemojn tradukitajn el pli ol 40 lingvoj! Do tiu homo estas vera talentulo pri lingvoj, sed ne nur pri ili: ĉar Lorenz havis kromajn talentojn, kiel rakontas lia biografiisto José Carlos Leal, en la libro *O homem que sabia demais*.

Lorenz forpasis en 1957 lasinte, kiel kutime okazas al intelektuloj, multe da paperaĵoj – domaĝe, neniu monbileto inter ili – kaj tie naskiĝas legendo. Oni ĉiam diris, ke inter tiuj paperoj estis diverslingve skribitaj tekstoj, provtradukoj, libroskizoj, ktp. Kio gravas por ni estas la fakto ke, inter la tekstoj verkitaj en Esperanto, unu ĉiam atentigis ĉiujn: Iam – oni ne povas precizigi kiam – Lorenz skribis gramatikon pri la tupia, la lingvo parolita de brazilaj indianoj! Bone, la fakto ke Lorenz estus verkinta tiun tekston estis, ekde tiam, fojfoje menciita, sed preskaŭ neniu, dum ses jardekoj, ja enmanigis tiun tekston... do, pro la tempopaso, multaj – inter ili mi mem – ne plu kredis je tio. Por multaj, tio fariĝis plia “legendo” de nia movado. (Same okazas kun la rakonto pri tio, ke Lorenz paroladis pli ol 80 lingvoj: mi simple konsideris tion nura troigo de liaj admirantoj!)



Lorenz
20-jara (1892)



Nu, la legendo kreskis laŭ la forpaso de tiuj kiuj, persone konis Lorenzon. Pro tio, sci-volema pri la vereco de tiu historio, Prof. Fabrício Possebon, esperantisto, latinisto, docento pri Scienco de Religioj ĉe la Federacia Universitato de Paraibo, decidis esplori pri kio ja estis vera. Serĉante la nepojn de Lorenz, li malkovris ne nur la originalon, sed, plie, ankaŭ havis de ili permeson eldoni ĝin!



*Oficiala lanĉo (aŭ ĵeto)
de la "Kompleta Gramatiko..."
Oktobro, 2015*

Dum la preparado de tiu teksto por eldona-do, Prof. Possebon, ĝentile kaj afable invitis al mi partopreni en la procezo, al kiu mi aldonis mian magran kontribuon, ellaborante etan vortaron de la vortprovizo ĉe-esta en la gramatiko de Lorenz kaj ankaŭ artikolo pri kontribuo de indianaj lingvoj al la eŭropaj lingvoj ĉeestaj en Ameriko. Sed oni pli scios pri Prof. Possebon en nia ĉi-numera intervjuo.

Fine, la *Kompleta Gramatiko de la Tupia Lingvo* estis oficiale lanĉita dum la Internacia Libro-Bienalo de Rio-de-Janeiro, kaj finfine ĉiuj esperantistoj povas ĝui tiun plian verkon de Lorenz: la nura gramatiko pri iu amerika indiana lingvo verkita rekte en Esperanto.

Kion ni povas konkludi pri tio? Ĉu Esperanto havas grandan, tamen neesploritan, trezoron kaŝita en diversaj, eble ĉiaj, branĉoj de la homa kono? Jes, sed tio ankaŭ pruvas, ke Esperanto ĉeestas en ĉiuj tiuj branĉoj. Tio elmontras ankaŭ ke, estas nepre necese, ke ni, esperantistoj, konu kaj disvastigu tiun trezoron, neniam permesante ke ĝi perdiĝu en la nokto de la tempoj.

Kaj oni povas ankaŭ konkludi, ke, kelkfoje, legendoj fariĝas realaj.

Fabrício Possebon bakalaŭriĝis pri Beletro ĉe Universitato de São Paulo (USP), magistriĝis pri Klasikaj Studoj (USP) kaj doktoriĝis pri Beletro ĉe Federacia Universitato de Paraíba (UFPB), kie li nuntempe instruas mitologion kaj klasikaj lingvoj en UFPB. Li jam publikigis en la portugala el la malnovgreka, el la latina kaj el la sanskrita. En esperanto li bibli-
kigis en la revuoj *La Karavelo* kaj *La Lampiro*, kaj ĵus ĉeforganizis la *Kompletan Gramatikon de la Tupia Lingvo*.



RE: *Fabrício, vi estas nekutima nomo en la brazila esperanto-movado – mi mem devas konfesi, ke mi neniam antaŭe estis aŭdinta pri vi – do, mi petas ke vi, dekomence, parolu iom pri vi mem, pri via esperantistiĝo kaj pri via partopreno en la esperanta movado.*

FB: Ekde mia infaneco mi aŭdas pri Esperanto. Kiam dekjaraĝa mi sekvis prov-kurseton proponitan de iu najbarino. Ne plene sukcesis tiu iniciato, tamen pri la afero mem mi neniam forgesis. Kiam mi loĝis en la urbo Campinas-SP, en la okdekaj jaroj, mi havis kontakton kun la loka klubo kaj partoprenis diversajn renkontiĝojn kaj kursojn. Tiutempe mi konis gravajn personojn de nia movado, kiel estis gesinjoroj Ledon, f-ino Elvira Fontes, s-ro Walter Francini, s-ro Sylla Chaves, prof-ro Geraldo Mattos, s-ro

Francisco Almada, ktp. Intertempe mi kiel memlernanto malrapide studis la verkon de Lorenz “*Esperanto sem Mestre*”. Neforgesebla estas la tago kiam en iu renkontiĝo en la urbo Jundiá, mi unuafoje komprenis nian lingvon dum parolado. Pro diversaj kialoj mi longtempe ne partoprenis la movadon, kvankam mi ĉiam abonadis revuojn kaj legadis librojn.

RE: *Pri la “Kompleta Gramatiko...”, kiel vi sciis pri la ekzisto de tiu teksto, kaj kie/kiel vi malkovris ĝin?*

FB: Leginte la biografion de Lorenz diversloke mi ĉiam vidis notojn pri tiu gramatiko. Mi studis iomete la tupian lingvon kiam mi estis studento pri beletro ĉe Universitato de São Paulo. Mi pensis ke multaj personoj kapablus eldoni tiun gramatikon pro la bezono koni minimume ambaŭ lingvojn. Mi prenis sur min tiun taskon por iel redoni al


“Mi prenis sur min tiun taskon por iel redoni al Lorenz parton el la granda kvanto da scio ricevita de lia laboro”

Lorenz parton el la granda kvanto da scio ricevita de lia laboro, en esperantista medio kaj ekster ĝi. Serĉinte informojn pri lia arĥivo mi trovis sinjorinon Luciana Novinski, iam respondeculo pri la Biblioteko Lorenz ĉe la komununo *Dom Feliciano*, kie longe vivadis Lorenz. Ŝi sendis al mi la manuskripton, fakte tajposkripton.

RE: Bone, vi ja sciis pri la teksto kaj malkovris ĝin. Tamen, kial vi decidis dediĉi viajn fortojn (kaj monon!) por eldoni tiun verkon?

FB: Lorenz laboregis sian tutan vivon disvastigante nekomunajn sciojn. Li vivis kaj mortis tre modeste. Per la studo de liaj verkoj mi multe lernis kaj iamaniere mi sentis la devon redoni ion al lia memoro. La eldonado de tiu gramatiko estis mia danko al li.

RE: Multaj personoj diras, ke, kvankam vera poligloto, Lorenz fakte ne parolis 80 lingvojn, kaj ke tio nur estas troigo de liaj amikoj kaj admirantoj. Laŭ vi, rezulte de viaj esploroj, kiom da vero, kaj kiom da troigo, ja ekzistas en tiu historio?



Kompleta Gramatiko de La Tupia Lingvo
CBLIE - São Paulo, 2015

FB: La homa kapablo estas vere mirinda. Mi ne dubas ke iu persono povus scipovi tiom da lingvoj. Vera mistero por mi estas la fakto ke li vivis en urbeto internlande de Brazilo kaj estante malriĉa, kiel li povus havi tiun grandan scion? En tiu kondiĉoj, kiel lerni lingvojn de Afriko, de Azio, kiel ĉinaj dialektoj, kaj eĉ indiĝenaj brazilaj lingvoj, ktp? Aliflanke ne estas simpla la respondo pri la koncepto “lingvoscio”. Ĉu estas lingvoscio se oni nur legas, aŭ nur komprenas, aŭ kapablas nur babili fremdan lingvon? Ĉu la baza lingva kono de turisto ne estas ankaŭ lingvoscio?

RE: Ĉu vi ja analizis, ĉu la tupia lingvo ja funkcias tiel kiel klarigita de Lorenz en lia verko? Ĉu iu fakulo pri la tupia jam analizis ĝin?

FB: La tupia lingvo neniam havis gramatikajn normojn. Kiel parola lingvo, ĝiaj variantoj estas senfinaj. Pro tio, la tupiaj

gramatikoj ne plene montras la tuton de la lingvo, sed montras la eblan gramatikon laŭ la disponeblaj fontoj. Laŭ miaj analizoj, la verko de Lorenz estas tute kontentiga, se oni konsideras la staton ĝeneralan de nia scio pri tiu lingvo en la komenco de 20-a jarcento, kiam li verkis ĝin. En la portugala lingvo ni trovas hodiaŭ grandan gramatikon kaj vortaron pri la antikva tupia. La samon ni trovas pri la gvarania en la hispana. Pri la amazon-tupia ni trovas en la portugala kelkajn

“la verko de Lorenz estas tute kontentiga, se oni konsideras la staton ĝeneralan de nia scio pri tiu lingvo en la komenco de 20-a jarcento”

metodojn kaj vortaron ne kompletan. Tiuj tri variantoj estas traktataj de Lorenz je diversaj gradoj.

RE: Konklude, kion vi povas diri pri la ricevado, fare de la esperanta komunumo, pri la verko?

FB: La eldonado estis malgrandkvanta, ĉar eble tiuj kiuj interesiĝos estos ankaŭ malmultaj. La enkondukoj de eseoj ene de la gramatiko donos la eblecon allogi pli vastan publikon. Se mi konsideras la tuton de la afero, mi diras ke la ricevado estos sukcesa. Ne estas multaj libroj en esperanto pri la lernado de fremda lingvo.





Emblemo de Universitato
Adam Mickiewicz

...aŭ la Interlingvistikaj Studoj ĉe UAM.

Kelkfoje amikoj, ĉu en Esperantujo, ĉu en mia privata aŭ profesia vivo, kiuj vidas kelkajn fotojn miajn ĉe Facebook aŭ alia

socia retumo, demandas min kion mi faris en Pollando, lando malvarma kaj tre malproksima. Kaj ĝuste tiu demando montras al mi ke ilin trafis la kaptilo! Ĉar tio donas al mi oportunon paroli pri la tielnomata “kurso en Poznano”, kaj estas interese konstati ilian surprizon scii pri la ekziston de tiu postdiploma kurso en kaj pri Esperanto. Inter esperantistoj estas granda scivolemo pri la kurso, ĝia strukturo, ĝia funkciado, ktp. Inter neesperantistoj svarmas aliaj demandoj: se miaj laborkunuloj en la universitato scivolas pri teknikaĵoj tute ne gravaj; ĉe miaj personaj amikoj abundas demandojn pri la vojaĝo, pri turismado kaj pri la ĉiutagaĵoj en Poznano.

Sed ne pri tiuj lastaj mi parolos ĉi tie (almenaŭ ĉi-foje), estas grave ke esperantistoj sciu pri tiu kurso, nura en la mondo kie oni povas studi Espe-

ranton en vera universitata nivelo.

La oficiala nomo de tiu kurso estas *Interlingvistikaj Studoj*, kaj ili okazas ĉe la Universitato Adam Mickiewicz, en la urbo Poznano, Pollando. Do estas kurso pri Interlingvistiko - branĉo de la scienco Lingvistiko kiu pritraktas artefaritajn lingvojn; kio, larĝsence povus enteni de la komputilajn lingvaĵojn, kiel binara sistemo, ĝis lingvojn kreitajn por televidserioj, kiel la klingona. Tamen, ĉar la precipa el la artefaritaj lingvoj estas Esperanto, nia fakta lernobjekto estas Esperantologio, esplorkampo kiu studas nian lingvon laŭ siaj multaj vidpunktoj: historio; kulturo; literaturo; kaj, kompreneble, la lingvo mem, kiu estas rigore analizita de ĉiuj eblaj anguloj: fonetiko, morfologio, sintakso, semantiko, ktp. Do, tio, kion oni tie faras, estas ĝisfunde plonĝi en la esperanta oceano.

Tiu plonĝado estas, por multaj homoj, vera defio: ja la kurso postulas legadon de diversaj verkoj pri ĉiuj supre menciitaj temoj, verkado de laboraĵoj por ĉiu lernobjekto kaj eĉ parolan ekzamenon pri ili! (Do, neniu pensu ke la gestudentoj turismumas!) Fakte, tioma postulado, eĉ se vere laciga por ni, estas kaŭzo ne nur de la bonkvalita nivelo de la tuta kurso,

respektata ene de la universitato mem, sed ankaŭ de la studentoj, kiuj estas bonegaj! (Kaj mi ne parolas pri mi mem, ĉar, ĝuste pro tio ke mi jam estis studinta tiuj temoj antaŭe, mi konfesas, ke mi iom flankenlasis la kurson en la unua jaro, kaj, kompreneble, ne sukcesis la notojn pri kiuj mi revis...)

Kaj se oni ankoraŭ parolas pri la studentoj, estas tre interese analizi la ĉiutagan kunvivadon de grupo en kiu dekomence estis 27 homoj el 14 malsamaj landoj en 4 kontinentoj. Fakte, oni travivas malgrandan e-kongreson, kie vere renkontiĝas homoj kun homoj. Sed ne nur la studentoj kongresas, ĉar la profesora teamo, kunordigita



Prof-ino Ilona Koutny

de Profesoro Ilona Koutny, estas vere plurnacia stelaro de homoj famekonataj pri sia kompetenco en



Studentoj de la Interlingvistikaj Studoj (2014-2017)

la temoj kiuj instruas: Vera Barandovská-Frank (Interlingvistiko), Zbigniew Galor (Esperanta Kulturo), Tomasz Schmielik kaj Istvan Ertl (Esperanta Literaturo), Ilona Koutny, Michael Farris kaj Marc Bavant (Esperanta Lingvo, en malsimilaj esplorkampoj), kaj fine Ulrich Lins (Historio de Esperanto), inter aliaj, estas nomoj kiujn vi certe trovos en iu ajn ekzemplero de la precipaj revuoj kaj plej furoraj aktualaj libroj de, en kaj pri Esperanto.

Se mi supre parolis ke, oni ne turismumas en Poznano, oni tamen multe promenas tra diversaj novaj ideoj kaj vidpunktoj pri la esperanto-movado kiuj estas tie debatitaj. Por brazilano kiu ĉiam vivis sian nacian – kaj precipe regionan – movadon, surloke konstanti la buntecon kaj diversecon de Esperanto antaŭ tiel internacia etoso estas afero ja kelkfoje ŝokiga, kelkfoje stranga, sed neniam teda: multaj ideoj, sintenoj, vidpunkton kiuj estas tie prezentitaj kiel normalaĵoj de la

internacia (tamen precipe eŭropa) movado estas aĵoj apenaŭ flustritaj ĉe brazilanoj, kaj, por tiuj, kiuj havas tre solidan imagon pri nia tutmonda movado, partopreni tiun kurson povas esti ŝanceliga, sed neniel neglektinda, eksperto.

Ankaŭ pri Instruado oni pensas en Poznano: la lasta studjaro de la kurso estas dediĉita al tiu demando, kaj, kune kun ILEI, estas instruista trejnado celanta kapabligi homojn ja instrui Esperanton laŭ internacie agnoskitaj kriterioj, por ke ili fariĝu vere kompetentaj en pedagogia flanko de esperanta movado. Bonega detalo estas, ke por partopreni tiun instruistan trej-



nadon oni ne bezonas studi la tutan kurson: ili estas apartaj, do vi ja povas partopreni en ĝi eĉ se vi ne volas studi en Poznano!

Do vi povas demandi al mi: “Sed ĉu vi ne amuziĝas dum tiuj studoj?” Kompreneble jes, ne hazarde dum septembro nia studsedio finiĝas ĝuste je la komenco de Arkones, pri kio vi legos tuj baldaŭ.

Oportunaj varoj por via bretaro atendas vin en nia libroservo!





ARKONES KONCERTOJ

Asorti
Ĵomart kaj Nataŝa
Melono Desnos
Anjo Amika
Zuzanna Kornicka

Se, kiel mi, vi kutimas aŭdi esperantajn radiojn, ĉu per interreto, mallongaj ondoj aŭ per via olda radioaparato, do nomoj kiel *Anjo Amika*, *Ĵomart kaj Nataŝa*, *Sepa kaj Asorti* tute ne sonas strangaj, ĉar vi certe jam aŭskultis iliajn kanzonojn. La veteranoj certe memoros kiam, antaŭ kelkaj jaroj, oni multege pli aŭdadis pri iliaj nomoj ol aŭskultadis iliajn kanzonojn. Ĉar, se hodiaŭ oni disponas pri multajn esperantajn radiojn, almenaŭ en la reto – en la pratempoj estis tre malfacile vere aŭdi kanzonojn en Esperanto: oni devis aŭskultadi radiostaciojn en AM sistemo (kaj en tiamaj programoj muziko ne havis grandan spacon) aŭ sintonizi, fojfoje kun kvaŝaŭ arkeologia pacienco, mallongondan radion, kaj preĝi por tie ion aŭdi.

Tamen, io estas aŭskulti pere de iu aparato, alia afero estas aŭskulti ilin persone, nur kelkaj paŝoj antaŭ vi

mem, vidi propraokule tiujn homojn kiuj frekventis nian menson, kaj ĝui iliajn kanzonojn. Se partopreno en Arkones estus nur tio, ĝi jam estus neforgesebla afero. Tamen, ankoraŭ pli neforgesebla estos la fakto ke mi ĉeestis la unuan publikan prezentadon de nova kd de *Suzana Kornicka* (memorigu tiun nomon!), kantistino kies varmiga voĉo, unuafoje aŭdinta, vi neniam sukcesos forgesi, eĉ se vi provos!

Sed kio estas Arkones?

La nomo venas el ARTaj KONfrontoj en ESperanto, evento kiu okazas ĉiujare, dum la lasta semajnfino de Septembro, en la pola urbo Poznano. Iom malsimila al niaj brazilaj eventoj – kie, ĝenerale, “artaj vesperoj” okazas je la fino – en Arkones la artaj eventoj okazas ĉiunokte, fine de la kutimaj prelegoj kaj fulmkursoj okazantaj



Suzana Kornicka ludas

dumtage. (Krom tio, oni samtempe povas, dise tra la koridoroj de la Arkonesejo, trovi budojn de diversaj eldonejoj, revuoj, esperanto-asocioj, ktp.) Plie, kaj tio ja multege kontrastas kun la brazilaj eventoj: Arkones estas evento al kiu esperantistoj iras por amuziĝi, ridi, kune danci, kune kanti kaj kune drinki. En Arkones oni tute ne planas “*kiamaniere Esperanto konkeros la mondon*” sed oni ja lernas, vivas, ĝuas Esperanton! Kaj mi povas ja diri, ke dum tiom da jaroj partoprenante esperantajn eventojn, unuafaje povis mi bierumi ne post la renkontiĝon, sed dum ĝi, kaj tio estas jam sufiĉa elmonro de la malpeza etoso de Arkones.

Tamen, ne ĉio estis amuziĝo kaj bierumado: kutime ĉe Arkones okazas diversajn prelegojn pri la plej diversaj temoj:


pri la fervojstacioj de Pollando, pri *Beletra Almanako*, pri slavidaj planlingvojn, interalie. Tiuj prelegoj, kvankam kelkfoje estis tri samtempe, estis ĉiam plenaj da scivolemaj homoj.

Do la plej bona en Arkones estas la etoso: mi konfesas, ke mi neniam vidis, en la sama loko, tiom da esperantistaj junuloj kune! Kaj mi tute ne parolas pri tiuj kiuj estas junuloj “de jardekoj”, tute ne!

Koncize: mi parolas pri uloj kun NEblankaj haroj! Tiuj, kiuj timas “oldiĝon” de la esperanta movado ja devas partopreni Arkoneson.



Ĵomart kaj Nataŝa ludas



MONDIAL NOVJORKO www.librajo.com

AERJ



Itinerante



**Dia 31/03 (qui) às 18h no Esperanto-Grupo Lázaro Luiz Zamenhof
Rua Abílio dos Santos, 137 – Bento Ribeiro. Resp.: Allan Argolo**

IV Feira do Livro Esperantista de Niterói

Praça Arariboya (Em frente às Barcas)

De 17 à 21 de abril deste ano de 2016

*ocorrerá a IV Feira do Livro
Esperantista de Niterói, junto à
estátua do índio Arariboya.*

*Realização: NITEK - Niterói
Esperanto-Klubo*

*Apoio: AERJ - Associação Esperantista
do Rio de Janeiro; KKE - Cooperativa
Cultural dos Esperantistas;
LORENZ - Sociedade Editora Lorenz e
IEBM - Instituto Espírita Bezerra de
Menezes...*



CONVIDAMOS A TODOS PARA VISITAREM A FEIRA, PARTICIPAREM
DESSE EVENTO SINGULAR E CONHECEREM UM DOS MAIORES
INVENTOS DA INTELIGÊNCIA HUMANA - O
ESPERANTO.

DAS 8 ÀS 20 HORAS...

RESPONSÁVEIS:

WALTER FONTES (21) 99919.5359:

CARLOS ALVARENGA (21) 97142.3223:

JOÃO MAIA (21) 98505.4070



17/04

kiam:

akceptado ekde la 8:30 kaj fino je la 17:00

kie: E-grupo Porto Carreito Neto – Av. Geremário Dantas, 655
Pechincha – Centro Espírita de Jacarepaguá



Progresadi

Esperanto post la baza kurso



La evento taŭgos kaj por kursgvidantoj kaj por lernantoj, kun la celo **altigi la lingvonivelon** de la karioka esperantistaro per didaktikaj, instruaj programeroj.